MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

ESPERANTO INFORMILO 3

Marto 2026 Kol. 487/42

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo** : Popolaj proverboj, Ĉu vi ŝatas neĝulojn, Koloraj tagoj de Paskoj, La frenezula turo, Forpasis PhDr. Kamila Bártlová

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## Popolaj proverboj en Ĉeĥio

**MARTO**

- Martaj sunbriloj havas mallongajn manojn
- Se marte ventas, aprile pluvas, certe la jaro pli fekundas
- Se oni la martan neĝon grunden plugus, kvazaŭ oni kampon bone sterkus.
- Kiom da nebuloj ĉielen marte leviĝos, tiom da frostoj post Pasko estos
- Se marto sen akvo estas - aprilo sen herbo restas
- Polvo en marto, koto aprile, la farmisto ridas pli ore
- Marto seka, malvarma aprilo, malseka majo - paradizo en garbejo

## Ĉu vi ŝatas neĝulojn?

De jaro al jaro neĝas malpli, sed en la tempo, kiam la neĝo aperas, allogas homojn krom sportoj ankaŭ konstrui amuzajn neĝajn figurojn - neĝulojn.

La unua skribita teksto kaj desegnaĝo aperis jam en la jaro 1380 en libreto de preĝoj.
Konata artisto deksepjara, Mikelangelo Buonarroti supozeble en la jaro 1492, konstruis neĝulon rekte en la korto de Mediceja palaco en Florenco en Italio. Ni pensas, ke tia neĝulo aspektis pli bone ol niaj kutimaj neĝuloj.
Figurojn el neĝo konis ankaŭ William Shakespeare, ĉar li parolis pri ili en sia dramo Rikardo la Dua.
Populareco kreadi neĝulojn kreskiĝis dum 18-a jarcento en Germanio, kie ili nomis ilin Schneemänner. La nomo aperis unuan fojon en la jaro 1770 en porinfana libro eldonita en Leipzig. El tia tempo estas kupra gravuraĵo de Daniel Chodovský. Sur ĝi estas neĝulo kiel signo de vintro kaj granda frosto, li mienas minace, en mano tenante balailon.



Bonaspektan vizaĝon de neĝulo kun rido el malgrandaj karbetojn kaj kun oranĝa karota nazo aperadis de la 19-a jarcento. De tiu tempo ŝanĝiĝis opinio de homoj pri vintro. En decembro 1892 aperis en la revuo „Anděl strážný“ (Anĝelo gardanto) por kristanaj infanoj bildo de gaja neĝulo, kiun ni ĝenerale konas eĉ en nia lando. La plej konataj neĝuloj estas sur bildoj fare de ĉeĥa konata pentristo Josef Lada en lia verko *Vzpomínky z dětství* (Infanaj memoroj). Liaj neĝuloj kun nazo el branĉetoj memorigas bonan avon.
Neĝuloj aperis en Guinessa libro de rekordoj - tiun, la plej grandan, oni konstruis en februaro 1999 en la usona ŝtato

Maine. La plej grandan ĉeĥan neĝulon (8,52 m.) oni konstruis komence de la jaro 2005 en vilaĝo *Dolní Třemešná*.



La neĝulo - Schneemann estis maskoto en jaro 1976 dum Vintraj Olimpikaj Ludoj en Innsbruck.

Ĉu vi scias, ke de la jaro 2010 oni festas Mondan Tagon de neĝuloj? Kreinto de tiu evento estas Cornelis Gratz el Germanio, kiu posedas la plej grandan kolekton de mondaj neĝuloj . Oni festas ĝin la 18-an de januaro. Kaj kial? La numero 8 memorigas neĝbulojn, el kiuj konsistas la figuro kaj la cifero 1 bildigas ĝian bastonon.

Oni diras, ke la neĝuloj havas sian specialan saluton: **Ĉiam ruĝa nazo!**

El magazino Retro tradice, Nro 12, p. 36 tradukis Blanka Hužerová.

## Koloraj tagoj de Pasko

Pasko estas festata la unuan dimanĉon post la unua plenluno de printempo. Por kristanoj la paskaj festoj estas pli gravaj festoj ol Kristnasko. Ĉi tiuj kristanaj festoj kaj iliaj ritoj baziĝis sur pli malnovaj judaj kaj paganaj kutimoj kaj rilatis al la natura ciklo. Vintre ili festis morton kaj printempe naskiĝon, novan vivon, kies atributo estas bunta ovo. Kial la tagoj de ĉi tiu semajno estas buntaj kaj kiaj kutimoj estis aŭ estas?
La lasta semajno antaŭ Pasko en la ĉeĥa lingvo signifas ĉefe tempon de purigado, bakadon kaj preparadon de ornamaĵoj. Sed ĉu vi scias, kio ĝi efektive signifas rilate al la tradicio? Aŭ kiam

kaj kial skrapi araneaĵojn kaj kiam, male, oni eĉ ne rajtas tuŝi balailon?
Ĉijare, la paskaj ferioj daŭros de Sankta Vendredo, la 3-a de aprilo, ĝis Paska Lundo, la 6-a de aprilo 2026.

**Palma dimanĉo**
Palma dimanĉo ankaŭ nomiĝas Pasio-dimanĉo, la dimanĉo antaŭ Pasko. La celebrado memorigas la triumfan eniron de Kristo en Jerusalemon kelkajn tagojn antaŭ lia martiriĝo.

**Blua Lundo**
Kial Blua Lundo? Oni diras, ke ĝi devenas de la koloro de la blua ŝtofo, kiu estis uzata por ornami preĝejojn - sed la germana vorto "blau" tradukita kiel nekapabla labori. Tio simbolis, ke ĝi estis tradicia ripoztago, kiam neniu laboro estis farita.

**Griza aŭ Flava Mardo**
Mardo estas iam nomata Griza kaj iam Flava - en ambaŭ kazoj la nomo estas motivita de la vetero, kiu estas karakteriza por ĉi tiu tempo de la jaro. En aprilo, la vetero estas variabla, foje suna, foje nuba. Oni ankaŭ diras, ke ĝi estas griza pro la araneaĵoj, kiujn oni devis skrapi de la domo.

**Malbela aŭ Cindra Merkredo**
Tiun tagon Judaso perfidis Kriston - do ĝi estas malbela tago. La tradicio diras, ke ni devus rideti, ĉar malbona humoro povas daŭri la reston de la jaro. Ĝi ankaŭ nomiĝis Cindra Merkredo - estis kutimo skrapi la fulgon de la fundo de la kamentubo kaj uzi ĝin por forpeli malbonajn spiritojn.

**Verda Ĵaŭdo** (Sankta Ĵaŭdo aŭ Paskoĵaŭdo)

Por kristanoj, ĝi estas tago de pardono, kiam oni manĝu ion verdan, ekzemple brasikon, spinacon aŭ urtikofarĉon. Oni prenis balailon el la domo al la plej proksima vojkruciĝo por seniĝi la domon de puloj. Oni nenion prunteprenu de iu ajn, nek kverelu - la rekompenco estus jaro sen kvereloj kaj enfluo de mono.
En la kuirejo oni bakis paskajn kukojn nomitaj judas-kukoj, kiuj havas la formon de la plektita ŝnuro, sur kiu Judas sin pendigis. Ŝmiri ilin per mielo signifis sanon dum la tuta jaro. Oni ankaŭ semis pizojn kaj linon - tio garantiis bonan rikolton.

**Sankta Vendredo**
Tago de silento, malĝojo kaj doloro. Kristanoj funebris Jesuon Kriston. Vi ne rajtas labori kaj kie ajn vi estas dungita – vi eblas plenumi ĉi tiun kondiĉon. Sankta Vendredo estas libera festotago en Ĉeĥio ekde 2016. Vi neniam devus movi la teron, trempi la lavvestojn kaj ordigi ilin. Vi ne devus prunti ion ajn de iu ajn, nek vendi, donaci aŭ akcepti ion ajn.

**Blanka Sabato aŭ Sankta Sabato**
Blanka Sabato estis la fino de la Karesmo. Matene, la dommastrino balais makulojn el la domo per nova balailo, por ke ĝi estu pura la tutan jaron. Kelkaj domoj ankaŭ estis kalkblankigitaj - tial la nomo Blanka Sabato, sed ankaŭ la nomo devenas laŭ la vestaĵoj de nove baptitaj homoj. Sankta fajro estis ekbruligita antaŭ la preĝejo, el kiu kristanoj povis ekbruligi grandan ceremonian kandelon, nomatan la Paska kandelo, kaj porti la sanktigitan lumon hejmen. Kamparanoj iris al la fruktoĝardenoj kaj skuis la fruktarbojn por bona rikolto. Dommastrinoj bakis paskajn kukojn kaj dolĉajn ŝafidojn el pasto, ornamis ovojn kaj knaboj kaj plenkreskaj viroj plektis el salikaj branĉetoj paskajn vergojn.

**Paska dimanĉo**
En la nokto de sabato al dimanĉo, Jesuo Kristo resurektis, kaj tial ĉi tiu dimanĉo estas Paska dimanĉo – ĝi estas la plej grava tago el ĉiuj festadoj por kristanoj. Iafoje ĝi estis okazo vesti novajn vestaĵojn, beni la paskan manĝaĵon, kiun homoj poste dividis kun gastoj.
Sed iom ankaŭ estis donata al la kampo, ĝardeno kaj puto, por ke estu bona rikolto kaj sufiĉe da akvo. Dommastrinoj laŭdire ne kapablas purigi aŭ ordigi litojn.



**Paska lundo**
Ruĝa lundo estas ankaŭ tago de vipado. En lokoj kie malnovajn kutimojn ankoraŭ estas sekvataj, knaboj eliras frumatene por kanti aŭ rime deklami kaj peti helpe de paskaj vergoj de knabinoj ornamitajn ovojn kaj tiel rejunigi ilin, alporti al ili belecon kaj sanon, sed ankaŭ forpeli mallaboremon. *La artikolon pri Koloraj taskoj trovis en la revuo Květy (Floroj) kaj mallongigis ĝin Eva Pazourková.* Tradukis en Esperanton „ijk“

**Gajan Paskon deziras al vi Mirka kaj Ludmila**

## La Frenezula Turo – ebla vizitloko dum UK 2026

La Turo de Frenezuloj ”Narrenturm” estas en Vieno. La turo staras en la areo de la iama Ĝenerala Hospitalo kaj estis konstruita en 1784 fare de Josef Gerl dum la regado de la aŭstria imperiestro Jozefo la 2a. Ĝi estas kvinetaĝa cirkla konstruaĵo kun 28 ĉambroj en unu etaĝo, mallarĝaj fenestroj kaj centra diametra alo orientita nord-sude.
Entute estis 139 individuaj ĉambretoj por la mensmalsanaj pacientoj. Ĉiu ĉambreto havas areon ĉirkaŭ 13 kvadratajn

metrojn granda kaj povas esti enirita el la cirkla koridoro. La gardistoj loĝis en la meza alo.
La aŭstria imperiestro Jozefo la 2a studis similajn instituciojn dum sia vojaĝo Francion. Konsiderante la historian kaj socian kuntekston la konstruado de la Frenezula Turo reprezentas progreson. La ĉambretoj por la ”frenezuloj” estis ekipitaj per necesejo kaj la centra hejtadsistemo.
Kvar fornoj en kelo de la konstruaĵo provizis la ĉambretojn per varma aero. Kiam ili estis konstruitaj, la ĉambretoj ne havis pordojn kaj la konstruaĵo ne estis ligita al la kanalreto. La patologia muzeo fondiĝis en 1796 dum la regado de la germana imperiestro Francisko la dua kiel muzeo de la Patologia-Anatomia Instituto. La kolekto estas en Narrenturm ekde 1971. La tiama Ĝenerala Hospitalo transformiĝis de 1988 ĝis 1998 al loko por universitataj institutoj, nomita Campus (kampuso).

El La Bulteneto,
kiun eldonas Walter kaj Renate Klag. Ora Ĵurnalo-92

## Forpasis PhDr. Kamila Bártlová




Ni ricevis malgajan sciigon, ke la 23-an de decembro 2025 forpasis PhDr. Kamila Bártlová, delonga membro de nia AEH. Ŝi vivis ĝis preskaŭ 95 jaroj.
Ŝi komencis studi Esperanton kiel junulino, instigite de sia patrino. Ŝi instruis la ĉeĥan lingvon en loka bazlernejo. Tie venis al ŝia menso la ideo - instrui al siaj lernantoj, kiuj montris intereson, tio estas